# *La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel vizitas Santiagon de Kubo*



Havano, okt 15 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel anoncis per mesa?o en Tvitero sian voja?on al la orienta provinco Santiago de Kubo, kie li plenumos laborviziton.

De anta? kelkaj tagoj, dum kunsido kun la portempa laborgrupo de la registaro fronte al la Covid-19, Díaz-Canel informis ke en la nova normaleco, oni reprenos la registarajn vizitojn al ?iuj provincoj, interrompitaj de anta? 7 monatoj pro la apero kaj avanco de la nova kronviruso Sars-Cov-2.

Tiu laborstilo ebligas al la gvidantoj de la ?tato kaj registaro, akompanate de la politikaj kaj amasorganizoj, esti pli proksimaj al la civitanaro kaj al ?iuj procezoj de produktado kaj servoj en ?iu teritorio, cele skizi strategiojn por plibonigi la ekonomion kaj sekve, la vivkvaliton de la kubanoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/236877-la-kuba-prezidento-miguel-diaz-canel-vizitas-santiagon-de-kubo

# Radio Habana Cuba